BOHEMA ESPERANTISTO

# ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy.

Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Redakce a administrace: Praha III, Kampa 495.

Redaktor: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097.

Vydavatel: Jan Iglauer, Praha III, Hroznová 6.

ROČNÍK IV SEŠIT 3

## Články. — Artikoloj.



## Různá sdělení.



PRAHA, 31. XII. 09. Cena 36 h

Vychází 20. dne v měsíci a je zdarma zasílán všem členům »Svazu českých esperantistů«, kteří zaplatili celoroční příspěvek 5 K. — Rukopisy, dopisy, knihy a časopisy zasílají se redakci. — Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka na odpověď. — Všecka díla redakci zaslaná jsou oznamována. Reklamace přijímá administrace jen do vyjití následujícího čísla. — Předpláceti a po číslech odebírati lze u administrace a ve všech knihkupectvích.

**Celoroční předplatné 4 K,**

pro členy spolků sdružených ve »Svazu Č. E.« 3 K, jednotlivá čísla po 36 h.

# Český esperantista-Bohema esperantisto

(*Red. kaj adm:* Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; *Jarabono* Sm 1·70) monata revuo por propagandado de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de **„Bohema asocio esperantista“** (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 20-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzoj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesataj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas rapidan respondon letere, aldonu poŝtmarkon.

## Sdělení redakce.

Toto číslo vychází bez obvyklých rubrik, zejména bez kroniky, poněvadž rukopis jich se poštou ztratil a na nové vypracování nezbylo času, nemělo-li se zpozditi vydání tohoto čísla už jinak opozděného. Všecky zprávy uveřejněny budou v čísle příštím, pro něž ztracený materiál bude znovu zpracován. — Na dopisy týkající se vydání kapesního kalendáře sdělujeme, že to byl podnik administrace, za niž přece ani redakce ani svaz nezodpovídá; ostatně poukazujeme na sdělení administrace. — P. J. Podlipský (Smíchov) a m. j. Mýlíte se, o vydání kalendáříku jsem zvěděl sám až po vydání; a proč tak zlomyslný ton?

## Sdělení administrace.

Upozorňujeme, že prvá čtyři čísla letošního ročníku jsou datována dříve nežli skutečně vyšla, resp. vyjdou, že proto neoprávněně někteří předplatitelé se horší, že čísla obdrželi později nežli někdo jiný. — Na výtku, že v kalendáříku »Č. e.« nebyl zařazen žádný esperantský text, sdělujeme, že to měl býti zápisníkový kalendářík (sledující účel spíše reklamní), který měl býti levný, což by nebylo možno, kdyby byl kalendářík zvětšen o část textovou. Kalendáříku zbývá už jen několik exemplářů (za 50 h, p. 55 h).

## Sdělení svazu.

Četným členům, kteří reklamují členské legitimace, sdělujeme zdvořile, že legitimace (i premii) zasíláme až po zaplacení příspěvku (5 K) nebo doplatku (1 K), jestliže zaslán byl příspěvek v obnosu 4 K.

**Došlé publikace.** — Lámání ubrousků (Arnošt Štěpán) vyd. Odbor. spolek hostin. pomocnictva v Praze II. za 1 K. — Světlo, lidový list kultury a střídmosti (Prostějov): I, 2. — Přehled revuí, V, 14, 15. — Volná myšlenka, V, 8. — Havlíček, II, 16. — Zahrada domácí i školní, IV, 4.

## Esperantská korrespondence — Esperanto korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 1·50. Členové svazu a spolků sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je prvé otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy[1]), pohlednice[2]), pošt. známky[3]), přejí si:

La unufoja enpreso de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aliĝintaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpreso estas senpaga.— Interŝanĝon de leteroj[1]), ill. poŝtkartoj[2]), poŝtmarkoj[3]) deziras:

25. Bedřich Zuzánek, oficisto en alumetfabriko, en Kunčice, p. Kyšperk, Bohemujo-Austrio.[1 2 3]) — 26. S-ro Karel Balcar stud., Bohemujo, Sezemice u Pardubic.[2]) — 27. S-ro Karel Tuček Praha III., Lázeňská ul. 525.[1 2]) (Bohemujo.) — 28. S-ro Karel Reinwald, Žižkov, Chodská ul. 18.[2]) (Bohemujo.) — 29. S-ro Masaru Eba, Mokpo Customs (Korea). [2]) sed nur kun pregejoj al infanoj. Ĉiam kaj tuj respondas. — 30. Pastro H. Egbers, Bury (Anglujo). The Rectory Elton. [1]) Ĉiam respondos.

# VÝZNAM ESPERANTA PRO ČECHY A SLOVÁKY.

Napsal *Jos. Krumpholc.* — (Pokračování.)

Neboť — co jest esperantismus?

Mýlí se, kdož vidí v něm jen hnutí k zavedení a rozšíření neutrálního, umělého jazyka ve stycích mezinárodních. Esperantismus jest více, mnohem více. Je to hnutí ideové, svrchovaně humanní, ethické, jehož cílem hlavním, cílem vnitřním jest idea čistého lidství, idea člověctví, člověčenství, idea sblížení nejen hlav, ale i srdcí, vzájemné pochopení, porozumění a spravedlivé ocenění — zkrátka: zbratření všelikých národů, nejen těch velikých, mocných, »rovnocenných«, ale i menších a malých, slabých, ohrožených — zbratření, smíření ideou blahovolné spravedlnosti na neutrálním základě jazykovém.[1])

A takové hnutí — idea čistého lidství — že by mohla národům a jich jazykům nebezpečnou býti? Neuvěřitelno! Nemožno! Vždyť dobro — a humanita, blahovolnost, láska, spravednost je přece dobro — čím větší, čím širší, tím jest i lepší. Lepší zajisté jest slunce svítící všem, nežli svíce svítící jen několika, praví náš Komenský a Palacký — otec národa — žádá, abychom oběti přinášeli nejenom na oltář vlasti, ale i celého lidstva, abychom tedy nepozbývali smyslu pro hnutí i světová, všelidská, k nimž nepochybně náleží i idea mezinárodního jazyka.

Svědčí o tom nejenom dějiny této ideje a pokusů o umělý jazyk mezinárodní, jichž za 300 let — od Descartesa podnes — na sta objevilo se a u všech téměř národů kulturních, ale zvláště ten zajímavý fakt, že mezi průkopníky této ideje byli i největší učenci a mužové vynikající rozhledem po ruchu světovém a jeho potřebách, učenci, jako Descartes, Pascal, Mersen, Le Maire, Dalgarno, Vilkins, Leibniz a j., zejména však i jeden z otců našich — Jan Amos Komenský, jehož národem tak rádi se

---

[1]) Viz kongressové řeči Dra Zamenhofa v »Esperantista dokumentaro« seš. I., 4., 6.

zoveme a jenž nás, jak praví ve svém Kšaftu umírající matky Jednoty »pokladů svých všech nápadníkem a dědicem učinil nejpřednějším«.

Zdaliž tedy ne i dědicem snah svých o umělý jazyk mezinárodní, nebo jak on říká »universální«, jímž po 30 let v největších a nejvelkolepějších dílech svých se obíral? — Zajisté, že tím otevřel duše naše, duše dědiců ducha svého vlivu i této své ideje, jež pak proto tím vítanější nám a plodnější snad bude.

A co pohnulo Komenského, že ačkoliv byl z prvních, kteří uvedli řeč mateřskou v její práva ve škole, ač nekonečná byla láska jeho k národu a jazyku jeho, přece duše jeho snažila se a toužila i za ideálem jednotného umělého jazyka obecného? — Byla to jeho naděje, že jazyk obecný umožní rozšíření osvěty a smíření svářících se národů. — A toť i naděje esperantistů. Hle, jak počínají se plniti prorocká slova Leibnizova: »Nastane doba, kdy zástup dobrých lidí bude pěstovati Tě, Komenský, i skutky i naděje Tvé, ba i žádosti«. Patříš-li i Ty, milý čtenáři, k onomu zástupu »dobrých lidí«? — — — (Pokračování.)

# ESPERANTO VE ŠKOLE.

Napsal prof. *Christaller* (Stuttgart). Z němčiny přeložila *Boža Vaníčkova.*

Každý, kdo bez předsudku přemýšlí o ceně a účelu mezinárodního jazyka pomocného, musí dojíti k výsledku, že věc ta není špatná, ale dokonce dosažení hodná, než v nejčetnějších případech řekne: »Pro mne nemá již žádné ceny, nemám již ani hlavy ani času naučiti se novému jazyku, ten by měl býti zaveden na školách.« To jest správné, není každý schopen ve vyšším stáří naučiti se novému, třeba sebe lehčímu jazyku, ačkoliv lidé s šedými a bílými vlasy stojí mezi nejnadšenějšími bojovníky pro esperanto, ale měli by také všichni, kteří seznali velikost kulturního pokroku vyplývajícího ze zavedení mezinárodního jazyka pomocného, k zavedení tomu působiti kdekoliv mohou: ve svých spolcích, by se tam přednášelo o řeči té, aby úřady, hlavně však učitelové důležitost věci seznali. Kdo pro to vše chuti neb příležitosti nemá, přistup jako přispívající člen k esperantskému spolku, který, čím četnější jsou jeho členové, čím více prostředků má, tím

bude schopnější působiti u školních úřadů podáváním vysvětlení a požadováním zavedení.

Toto zavedení jest v zájmu každého jednotlivce i kdyby pro svou osobu ani nejmenšího užitku z jazyka toho neměl míti.

Nehledíc k idealnímu užitku, jaký dává vědomí pracovati pro velkou věc — při čemž uspokojení jest ještě zvyšováno, neb v našem případě jest viděti, jak zřejmě idea pokračuje a hradby nevědomosti a lhostejnosti dobývá — nehledě docela k tomu, má zajisté každý, když i ne vlastní dítky neb synovce neteře neb vnuky, aspoň někoho, jehož blaho i bol jest mu blízký. Ale, i kdyby toho nebylo, má zajisté sáček, jehož obsah jest mu blízký, a z něhož otcovský stát hledí pokud možno nejvíce vylouditi a vybírá. Nyní jest též známá věc, že naše blázince čím dále tím rychleji stávají se malými, že jest stále nových potřebí, známo jest též, že prostředky k tomu musí býti brány a přinášeny od milých poplatníků daní. Tu se mnohý bude ptáti: v jakém vztahu jest esperanto nebo ne-esperanto k blázincům?

Nu, co myslíš, milý čtenáři, že se stane, budeš-li krmiti svůj žaludek starou kůží, pečenou lepenkou a podobnými věcmi, pro které on žádné »porozumění« nemá, a které ani tobě nejsou vhod? On musí časem stávkovati a onemocněti. A duševní žaludek mládeže není také žádný »koňský žaludek«, jenž vše snese. Zeptejme se sta žáků na jich poměr k jich školním předmětům, zvláště k jazykům a zvláště k starým jazykům, a zajisté devadesát z nich rádo připustí, že tyto jsou se starou kůží na rovni. Taková obrácená duševní strava, spojená s mnohahodinným civěním v mučírně — mladý člověk v době svého vývoje není k takovému cvičení určen, taková »výchova« musí míti škodlivé následky pro boj životní. A má je v bohaté, stoupající míře. Také v blázincích. Mnohý snad řekne: to dělá alkohol. Zcela správně, ale nevyhledává červ, hmyz právě slabé neschopné obrany? A celá sexuelní bída, také v německém národě, jež zajisté zalidňuje blázince, není tu podporována každodenním až desítihodinným civěním? Nejsme jen ještě zvyklí věc tu posuzovati s tohoto hlediska. Poznáváme již mnohé, usilujeme zavésti do škol trochu více pěstění těla — pěstění mládeže — ale zarytí školní představení s nářkem zdvihají ruce k nebi: Kde vzíti čas, všude se již křičí o přetížení a nyní máme ještě konati vycházky, pěstovati mysl pro vše krásné, uvésti oko a ruku do světa forem! Kde vzíti čas?

Esperanto jest zde vejcem Kolumbovým.

Vyšinul by se snad svět z kolejí, kdyby se na našich školách před dvanáctým rokem žádnému cizímu jazyku neučilo a získaný čas použil se ku pěstění mládeže? Sotva. A kdyby se potom do čtrnáctého roku jako jedinému cizímu jazyku vyučovalo jazyku mezinárodnímu na všech i obecných školách? Těžko. Mnohý řekne: esperanto zavésti na obecných školách jest nemožno. — Rozumí se samo sebou, že ovládnutí pomocného jazyka na této škole není dobře myslitelno, ale kdo něco z esperanta rozumí, jest přesvědčen, že by se žáku obecné školy mohlo poskytnouti tolik vědomostí z jazyka pomocného, kolik i nyní má čtrnáctiletý žák reálky z jazyka francouzského. Co chceme více? Základ pro pozdější pokračování v učení byl by položen a žák byl by zcela jinak než nyní členem lidské společnosti, nebyl by již tak k hrudě poután. Mnohý čtenář nebude snad s takovým výsledkem srozuměn. Zkoušej, neleží-li příčina v stavovském egoismu. Pro sebe i své děti zajisté si přeje, by byly jak jen možno ozbrojeny proti osudům života.

Ve Francii, která v hnutí esperantském kráčí zase na vrcholu civilisace, jest vyučování esperantu na četných školách zavedeno. F. Durieux, představený školy Montesquieuovy v Lille, uveřejňuje právě ve »Franca esperantisto« serii článků, kdež podává zprávy o svých dosavadních zkušenostech Jmenuje zájem o esperanto dokonce »ilo de moraleco« (prostředek k umravnění): Často zříme hochy, kteří na kiosku novinovém pátrají po nahotách. Ze zlé vášně bychom je nejlépe vyléčili, kdyby byla vystřídána novou, vznešenější. Tak často sport poštovních známek, sbírání lístků vyhledaly dychtění a peněžní sáček mladých lidí. Esperanto má působiti podobně a má ještě krom toho užitek praktické ceny pro život. Viděl, jak mladý muž zanechal kouření a čtení románů, by měl peníze a čas pro esperanto. Žáci opouštějí školu a zakládají klub s týdenní schůzkou, ve škole ukazují si lístky, jež obdrželi nebo které chtějí odeslati, mluví o jich kráse, hledají místa na mapě, rozmlouvají o odpovědi — vše v esperantu. Též nepřímo jest tato korespondence užitečna: neb mnohý žák neměl by bez ní příležitosti nabýti zběhlosti a cviku v korespondenci, nyní ji má a mimo toho ještě zajímavé zaměstnání výběrem případných lístků, malováním neb kreslením jich, musí-li naznačiti plán neb cestu do školy atd. Jinak může býti povzbuzován též smysl pro umění, pozornost pro krásu a zajímavost, jak píše na př. cizozemský žák: »Rád vyměňuji si lístky, ale sbírám jen umělecké, představ-

vující význačnou malbu neb pěknou sochu«. Učitel táže se žáka: »Kdo vyhledává však takové lístky?« Se sebevědomím odpovídá žák; »Já sám«. Dobře, praví učitel, posoudíme tvůj vkus. Když pak vybrané lístky přinese, jest o ně všeobecný zájem.

Zavedení esperanta co prvního cizího jazyka, znamenalo by též význačný pokrok pro vyučování samo, opravdové vykoupení pro žáky i učitele. Význačný pokrok: jest to vůbec rozumné, vyučuje-li se nyní v téže době, kdy mladý člověk ještě neovládá dobře jazyk mateřský jednomu, v druhém roce jak možno ještě druhému a v příštím roce ještě třetímu cizímu jazyku? A co nepředpojatému nejzvláštnějším jest, že začíná se nejčastěji s tou nejtěžší latinou místo aby se volila ta, jež jest jazyku mateřskému nejbližší. To by byla pro Němce angličina. Studium latiny a řečtiny, jakož i moderních jazyků má zajisté svoji cenu, ale jistě ne takovou, jakou by zasluhovala ohromná spotřeba času. Každý ví, jak zrovna žalostný jest praktický výsledek. Kde jest žák, který by po osmiročním učení se frančině třeba, mohl se súčastniti zábavy v jazyku tom vedené? O starých řečích ani nemluvím. Právem praví dr. Küppers v »Zeitschrift für Naturheilkunde«: »Mají též naši potomci obětovati právě nejkrásnější dobu svého života strašnému božstvu pěti různých nesmyslně komplikovaných jazyků? Co známe z naší německé literatury? Kdo z nás ovládá němčinu tak, by mohl bez přípravy veřejně mluviti?«

Vše, co nynější vyučování cizím jazykům skýtá našim žákům, to skýtá vyučování esperanta v mnohem vyšší míře. Logická stavba této řeči podněcuje silně logické smýšlení. Učíme se zcela jinak pohlížeti a posuzovati mateřský jazyk a především má zde praktické upotřebení mnohem větší půdu — předpokládaje ovšem, že by jazyk ten co povinný předmět, co první cizí jazyk v kulturních zemích byl zaveden.

Již však opravdové vykoupení znamenalo by esperanto jako jediný cizí jazyk před 14. rokem. Není-liž to nyní často tak, že má-li učitel 40 žáků, má před sebou 40 malých nepřátel a že těchto čtyřicet učitele za svého nepřítele považuje, proti němž jsou lest a podvod oprávněné zbraně.

Nyní musí žáci cvičiti, poslouchati a pamět cpáti tvary a pravidly, výjimkami z těchto pravidel, výjimkami výjimek. S pravou německou důkladností, jež by byla hodna lepší věci, musí se učiti nepravidelným slovesům, ačkoliv mnohé z nich od příslušníků dotyčného jazyka snad jednou v pěti letech neb vůbec nejsou upotřebena (jak málo Němců na př.

používá tvarů jako: trüge (od tragen) neb trügen = täuschen, böge a pod.). U esperanta může se však uplatniti touha po tvoření, jež leží v každém mladém člověku, radost z tvoření obšťastňuje učícího. Celé vyučování mohlo by býti v přírodě, spojeno s procházkou.

Jakou rozkoší byla by taková dopolední esperantská vycházka, jak sblížili by se tu učitel a žáci jako lidé a ne jako nepřátelé, kteří si navzájem léčky kladou. Dr. Küppers praví dále: »Jest bezpodmínečně nutno poznati Homéra a Horace v původním textu? Nevynalezli jsme tyto věci jako nedovolené týrání? Kde zůstavili studium přírody, matematiky, hudby? Kde pěstění těla, plování, tělocvik, hru v přírodě? I noci zabavili naše studie řečí. Ohnuly naše záda, zhubly naše tváře, zkrátily náš zrak«. Vskutku pravé vykoupení by bylo, zjednati zde nápravu!

A nyní ještě několik údajů o uskutečněném již přijetí esperantského vyučování, při čemž ostatně nutno podotknouti, že v jednotlivých případech se jedná též o vyučování dospělých, které se koná v místnostech školních. Udání tato vyňata jsou hlavně z esperantských časopisů tohoto roku (1909) a nemohou tedy býti úplnými zvána.

Ve Francii ve škole již jmenované v Lille mělo vyučování tak dobrý úspěch, že sám inspektor jevil zájem o ně a nařídil, by od podzimu 1907 na všech jemu poddaných školách ve vyšších třídách škol obecných a v třídách obchodních bylo esperanto jako povinný předmět zavedeno. Tak bylo již v březnu 1909 asi 1200 žáků a žákyň esperantu vyučováno. Z mnoha jiných škol země oznamují se nepovinné kursy esperantské; v Bordeaux jest v jedné velké škole zaveden povinný kurs; v St. Claude vyučuje se v jedné soukromé škole již od r. 1902; ročně obdrží 40 až 50 chovanců vysvědčení (atesto pri lernado). Zde, jakož i v St. Omer tiskne se pro tato vysvědčení zvláštní diplom. V Paříži v lyceu Henri IV. utvořila se skupina mládeže, která čile provádí propagandu a na jiných školách zřizuje odbočky, nyní zakládá se »Franca federacio de junaj esperantistoj«. — Z jiných škol může se ještě vytknouti řemeslnická škola v Rouenu a obchodní a průmyslová škola, jakož i obchodní škola pro ženské zaměstnané v Boulogne s./M.

Z Anglie se oznamuje, že se tam na 40 školách esperantu úředně vyučuje. — V zimním kursu obecné školy v Blackpoolu učilo se as 50 žáků s velkým zájmem. Mezinárodní obchodní škola v Leeds má pravidelné vyu-

čování. Universita v Oxfordě zavedla místní zkoušky, obchodní komora v Londýně má zkoušky již as 3 roky, rovněž tak jeden rok anglický národní svaz učitelský. Při 4. skotském kongresu esperantistů v Perty mluvil příznivě též předseda školní rady.

Ve Spojených Státech byla podána předloha v státě Ohio, zavésti esperanto na školy; ve státě Oregon se podobná připravuje. »Roxburg-Latin-School«, vyhlášená přípravná škola pro harvardskou universitu v Bostoně, má již delší dobu vyučování esperantu, hlavní učitel Lowell jest místopředsedou »New England Esperanto Asocio«. Hojně navštěvovaný pokračovací ústav v Chautauqua, který jest druh lidové university ve velkém slohu, jest tak zaujat pro hnutí, že se tam letos bude konati národní kongres esperantistů.

Z Brasilie jmenujeme Quaratinquetá, kde se s úředním svolením na jedné obecné škole vyučuje; v Ampara sám školní ředitel zpracoval vyučovací kurs. V Palmě (stát Minas Gereas) založili žáci kroužek. V Rio de Janerio »Berlitz School« přijala pomocný jazyk ve svůj program.

V Peru universitní profesor Villareal, vedoucí časopis »Antaŭen esperantistoj« byl požádán ředitelem umělecko-průmyslové školy v Limě o udání učebnice a bližších sdělení, neb chce tento zavésti týdně dvouhodinný kurs poloroční.

Při americkém vědeckém kongresu v Santiago učiněny byly dvě resoluce, mající pro esperanto velký význam: 1. kongres doporučuje esperanto jako mezinárodní neutrální jazyk, který by měl zaujímati důležité místo v programu vyučovacím na školách amerických národů; 2. kongres si přeje, by byl svolán mezinárodní kongres, který by rozřešil otázku zavedení neutrálního jazyka pomocného a usnáší se požádati vládu Spojených států, by toto přání kongresu uskutečnila.

Z Rakouska nutno vytknouti ve Vídni Novou obchodní akademii a Exportní akademii, jakož i ústav slepců, kde jsou kursy. Ve Štýrském Hradci bylo aspoň dáno slohové théma »Kulturní jazyk a esperanto«, rozmluva mezi esperantistou a přítelem jazyka národního. Oficielní kursy mají dívčí průmyslové školy v Budějovicích a Písku, obchodní škola Nového gremia v Praze*), jakož i gymnasium v Kremži, Moravské Ostravě, reálka v Prostě-

*) Omyl spočívající na nesprávných informacích »Unie česk. esp.«
*Pozn. red.*

jově. Také na české vysoké škole technické jest přednášeno o esperantu. Vysoká obchodní škola v Pešti zavedla rovněž vyučování esperanta.

Z okrsku polského jazyka jest uvedeno celkem 10 škol, a to ve Varšavě, Krakově, Lvově a Lodži.

V Rusku má Riga na gymnasiu vyučování esperanta. Tomsk v Sibíři má na technické škole studentský kroužek a v Jenissejsku jest gymnasijní inspektor Frenkel již po léta neúnavně činným v propagaci esperanta, on způsobil výměnu lístků s obrazy z tříd esperantských.

V Kystendži v Rumunsku jest na námořnické škole kurs, rovněž tak na vojenské škole v Bukurešti ku přání samého ředitele. V tomto městě má jeden anglicko-německý ústav esperanto co předmět povinný a na ústavě slepců tamtéž vede slepý sám kurs.

V Řecku v Patras jsou 2 kursy na obchodní škole a jeden na škole domácnosti, rovněž tak v Samos na škole obchodní.

Ve Španělsku má »Ecola Universitaria« v Barceloně čtyři nové kursy, vojenská škola v Madridě jeden a hudební konservatorium ve Valenci vydalo podmínky pro mezinárodní konkurenci též esperantsky.

V Holandsku má vychovávací ústav v Roermondu jeden kurs.

V Dánsku má Odense na své vysoké obchodní škole esperanto též v programu.

V Belgii podala »Esperanto Ligo« žádost ohledně zavedení do škol; záležitost ta bude též na příštím kongresu učitelském přednesena, aby žádost tu podporoval. Poněvadž okamžitý úspěch není možno as očekávati, bude žádost ta každoročně opakována. Ústav slepců Weluwe u Bruselu má již jeden rok vyučování esperanta. Páter Isidoro, profesor tamtéž způsobil též při letošním kongresu slepců v Neapoli usnesení, by pomocný jazyk byl na ústavy slepců zaveden. Arcibiskup z Mechelu dal na svém semináři přednášeti o esperantu nadšeným propagátorem páterem Richardsohnem a přísedící vyučovací správy v Antverpách jest hnutí esperantskému příznivě nakloněn.

Ve Švýcarsku zavedly vlády francouzských kantonů Ženevského, Waadtského, Sreiburgského a Neuchatelského na vyšší a obchodní školy esperanto co nepovinný předmět.

Z Německa jsou oznámeny kursy na obchodní škole v Hamburku a Kolíně a na zemském vychovávacím ústavě v Haubindu. V Gothě jest v obchodních třídách reálných škol pomocný jazyk zaveden co předmět nepovinný. Také na Polytechnikum v Cöthen vyučuje esperantu zkoušený učitel. V Berlíně pojala Humboldt-Akademie pomocný jazyk do programu přednášek. V Drážďanech uspořádal Sächsische Esperanto-Institut, podřízený ministerstvu, před nedávnem učitelský prázdninový kurs.

Též v mimoevropských zemích docílilo esperanto již mnoho na školní půdě; v lyceu v Tunisu jest kroužek žáků (40); jistý misionář podává zprávy o 30 mladých esperantistech v Zululandě, plukovník Pollen o rozšíření esperanta na školách indických.

Na ostrovech fidšských v městě Levanka učí se na jedné státní škole 30 domorodců esperantu a v Aidinu v Malé Asii jsou kursy na turecké a indické škole.

Z »Eňo esperantista« (r. IV. č. 39., 41).

# ANTISEMITISMO KAJ PROGRESO.

De *Joseph Eydelnanth* (Andeville). — (Daŭrigo.)

Kaj neniu dirus ja, ke la angla popolo estas malnobla, rabema k. t. p. sole tial, ke troviĝas kelkaj anglaj uzurpistoj! Tamen pro kelke da pli ol malnoblaj Hebreoj, oni tuj kulpigas la tutan popolon de Hebreoj! Kie estas do logiko? — Meditante de tago al tago, de jaro al jaro pri solvo de tiu-ĉi problemo, mi ne unufoje demandis min mem, kial oni volas nepre detrui aŭ sensignifigi Hebreojn — ĝuste Hebreojn kaj ne iun alian popolon? Kial? Kaj post longa meditado mi alvenis al jena konkludo, kiu eble ne ŝajnos al miaj legantoj tiel stranga...

Vi probable ne unu fojon aŭdis pri tiel nomitaj »pogromoj« (dismortigo, disrabigo) en kristana Rusujo. Ĉu ni ne rimarkis kiel mi, ke tiuj pogromoj koncernas sole Hebreojn? Kaj estu ankaŭ certa, ke, se morgaŭ vi legos en via ĉiutaga gazeto malgrandan telegramon, sciigantan vin pri pogromo, — estu do certa, ke oni mortigas tie sole Hebreojn kaj ne iun alian popolon, loĝantan en Rusujo. Kial do oni povas esti certa, ke oni mortigas opege sole Hebreojn (kaj ankoraŭ je la nomo de Dio)? Kial tia stato de aferoj? Ho, tute

simple: se rusaj vilaĝanoj batos, rabos kaj mortigos ekzemple germanajn loĝantojn en Rusujo, tuj Germanujo sendos siajn soldatojn por gardi kaj defendi siajn samnaciulojn, se eĉ tiuj batataj Germanoj estas rusujaj regatoj. Tio same okazos ankaŭ rilate al iuj Montenegroj, kiuj loĝas en Rusujo, kvankam Montenegrujo ne povos ja sendi siajn soldatojn en Rusujon kaj tiel valorigi la vivon de siaj samnaciuloj, tamen... la eŭropa politiko tion ne permesos. Nu, kaj kun Hebreoj? Kiu ŝtato sendos tiajn soldatojn, kia politiko ilin defendos?... Vere strangan tempon ni travivas: se oni batos en Rusujo Germanojn — Germanujo diros tuj, ke ĝi ne povas toleri tion kaj ĉiuj ŝtatoj konsentos kun ĝi. Sed kiam oni batas Hebreojn, tiam la eŭropa diplomatio fiere diras: ni ne povas miksi nin en internajn aferojn de fremda lando! Efektive, kiam oni elpikigas okulojn aŭ trapikas ventron de iu graveda Hebreino, tiam oni nomas similan agon, kiel internan aferon... En tragedio mem oni povas trovi kelkafoje amuzan koincidon...

Mi memoras unu vintron, kiun mi pasis en Aŭstrio. Apud granda tablo en kafejo, ne tro malproksime de Wien'a Prater, ni kelkaj studentoj, pasis nian vesperan tempon. Ekstere estis pli ol malvarme kaj agrabla temperaturo de kafeja ĉambro dolĉe varmigadis nian frostigitan korpon. Ni parolis pri la lastaj okazaĵoj en Wien. Kaj post kelke da tempo nia konversacio alvenigis nin al Dro Herzl, famekonata sionisto. Mi de la tuta koro defendis lian vidpunkton, komprenante eble pli per koro, ol per spirito la noblan deziron kaj revon, kiun havis mortinta savunto*) de mizeraj siaj fratoj.

»Kiel, vi estas nacionalisto! Vi, kiu volas labori por la tuta homaro! Vi, al kiu socialismo diras ion...«, kaj nedetenebla torento da riproĉoj (cetere tute malsaĝaj!) superverŝis min, sed tute ne... tuŝis mian »hontecon esti nacionalisto«, nek miajn sentojn. Unue, mi ne komprenas, kial

*) Mi uzas la formon »savunto« en tiu sama senco kaj ordo de ideoj, kiel ni uzas formojn: »savanto-savinto-savonto«. Savunto estas tiu homo, kiu savus, se... li povus. Li ne povis esti savanto, nek savinto, nek savonto, ĉar li ne savas ja, ne savis kaj ni ne povas esti certaj, ĉu li savos, ĉu ne. Sed ni povas supozi, ke tiu homo laŭ siaj agoj, povus savi, se iu kaŭzo (morto) ne malhelpus al li efektivigi lian revon. Tial, ni povas — ŝajnas al mi — uzi la formon »savunto« en supozita tempo. Ke Zamenhofuloj ne koleriĝu! Mi ne estas reformemulo kaj estas fidela principa malamiko de idoj de multnuanca Ido-patro. *J. Eydelnanth.*

esti sionisto (t. e. nacionalisto) signifas esti... malprogresema homo? Imagu al vi (ĉu oni devas sole imagi?), ke Bohemoj anstataŭ esti en sia propra lando mastroj, estas mem mastrataj. Kaj poste imagu al vi, ke mastranto de tago al tago sole pensas kaj pensas kiel detrui (esprimo tute ne forta) unue spiritan vivon de bohema nacio kaj poste forpreni la rajton ekspluati ĝian teron kaj bienon laŭ sia plaĉo kaj bontrovo. Kaj ĉiuspecaj turmentoj longvice venas seninterrompe. Nu, tiam Bohemoj diras al si mem (kaj tute prave): »Kiel, oni venis al ni kaj oni ordonas al ni! Ni estas — ŝajnas al ni — en nia propra hejmo! Ne, ni ne volas submetiĝi sub jugo de fremdulo, ni batalu do por liberigi nin!«

Ĉu tia parolado mirigos vin? Mi pensas, ke ne. Kial do oni miras, se Hebreoj volis sin liberigi ankaŭ de fremda jugo, revante realigi noblan revon de D-ro Herzl, iĝante sionistoj! Proprediri mi ne vidas grandan diferencon inter sionismo kaj... bohemismo: celoj kaj kaŭzoj estas preskaŭ la samaj (privilegio de ĉiuj subpremataj popoloj: egaleco en suferado!) kaj deziro absolute la sama: libereco!

Sed, trankviliĝu! Mi ne estas partiano de sionismo kaj tio-ĉi pro kaŭzoj, por klarigado de kiuj al mi malfeliĉe mankas loko kaj krom tio ĝi sole deflankigus min de nuna temo.

Ĝenerale, kiam oni defendas iun ajn teorion, oni havas la kutimon alvoki ateste ne sole vivantajn, sed ankaŭ oni ĝenas ostojn de jam de longe mortintajn homojn, sed mi devas konfesi je mia honto, ke simila metodo de diskutado tute ne plaĉas al mi. Efektive, se mi por defendo de miaj pensoj elvokos dudek atestantojn, kiuj diros kun mi »jes«, tuj troviĝos iu kontraŭulo, kiu eltrovos aliajn dudek homojn, — librojn, kies paroloj havos sencon rilate al mia teorio de absoluta »ne«! Kaj sume per tia metodo oni — verdire — nenion pruvas. Sed, diru al mi, ĉu vere, ni ne posedas almenaŭ iom da bonsenca kapableco de nia propra spirito por peni pensi per ni mem kaj sen tio, ke ni devas nepre alvoki atestojn de iu ajn persono, ke li estu eĉ kompetentega. Mi scias tre bone, ke anarĥistoj ne estas treege amataj de nia socio, mi ankaŭ ne tro ŝatas bombojn kaj aliajn eksplodilojn *), sed, ĉu ni ne ripetas ĉiutage kaj eĉ reve dum la nokto trifoje anarĥistajn dezirojn: ni estu pli bonaj, ni

---

*) Personoj, kiuj juĝas pri anarĥismo sole laŭ »bomboj« estas pure homoj ignorantaj unu el brilo de homa pensado. *J. Eydelnanth.*

penu estimi unu la alian sen distingo de koloro de vizaĝo, sen distingo de formoj de nazoj; ni studu, ni laboru per scienco por atingi la veran progreson! Certe ni tion ripetas kaj reripetas tage kaj nokte! Sed, mi demandas, ĉu vi estas sole papagoj? Kial deziri, se oni ne penas sincere efektivigi sian deziron?

Ne, antisemitismo ne ekzistas, ekzistas sole politiko de kelkaj frenezuloj, por kies ŝuldoj pagas Hebreoj, ĉar sole ili solaj ne havas protektanton, eble krom homa indiferenteco. Kaj, se oni diros al mi, ke tio estas ne politiko, sed vera malamo, — mi neniam kredos! Oni devas perdi ĉian kredon al ekzisto de iu mistera fajreto, kiu senlace brilas en koro de homo, instinkte puŝante lin al bono, — por pensi, ke povas ekzisti iu malamo rilate al la tuta popolo!

Kaj kiu estas plej ofte antisemido? La Hebreo mem! Por aĉeti por si bonan kaj valorigan socian pozicion, li pagas per malnobla kalumnieco rilate al siaj propraj fratoj. Kaj se iu juĝos pri hebrea popolo laŭ la specimeno de tiu renegato, — oni povas preskaŭ kompreni la malamon de tiu »iu« al Hebreoj . . . Kaj strange, tiu renegato iĝas ne sole nacionalisto, sed ankoraŭ plej malnobla ŝovinisto kaj malamiko de ĉiu libereco. (Fino.)

# EL LA BOHEMA FLORARO.

Kolekto da citatoj el la verkoj de la bohemaj aŭtoroj.

Elektas kaj tradukas *H. K. Bouška.*

I.

*J. S. Machar: Konfese literáta (Konfesoj de la literaturisto).* *)

— La puno, per kiu la socio persekutas individuon, estas barbaraĵo, sentaŭgaĵo, la rekompenco pro la meritoj malsaĝaĵo. — (Ĉap. I., pĝ. 11.)

— Nia konscienco estas kontenta, se ĝi ricevas ian formulon, ian skatoleton, kiu povas multon enhavi kaj kiu estas bone fermebla. Kaj se la mokema racio ne traboras en ĝi trueton. — (I, 12)

*) J. S. Machar: *Konfese literáta* (Knihy feuilletonů. Třetí). Praha, »Čas«, 1901. Dva svazky à K 2·50.

— Ĉiu pasinta kaj finiĝinta fazo de la vivo ŝajnas al ni esti pli feliĉa ol la estantaĵo. Kaj la feliĉo de tiuj tempoj kreskas en niaj rememoroj kun la perspektiveca malproksimo. — (II, 13)

— Oni vivas kun la plendo pri la feliĉo de la tempo estinta, kiun feliĉon oni propre malofte sentadis en la tempo estanta kaj eble en la horo de la morto la tuta vivo ŝajnos al ni feliĉa... — (II, 13)

— Ni skeptikuloj eble estas pli proksimaj al la vero, sed ne al la feliĉo... — (III, 21)

— La infano ne forgesas — sed ĝi ankaŭ ne rememoras. La juna animo kaptas novajn kaj novajn impresojn, la memoro ĵetas ilin senorde ien al fundo, ĝi ne revizias, ne kontrolas — ĝi ne havas la tempon. Aperas al ĝi freŝaj kaj nekonataj formoj de la vivo kaj de la mondo, homoj, regionoj, libroj, naturo, historio, komencoj de la sciencoj — oni devas antaŭ ĉio halti, peni ĉion ĉi iel kompreni kaj proprigi al si, ĉiam kiel eble plej rapide kaj tuj denove vivi plu kaj plu. Novarum rerum cupiditas*) estas movanta radeto de l' infana vivo. — (VIII, 43-44)

Gimnazio... Komencis do vico da lacigantaj, senfortigantaj jaroj; ni fordonis niajn freŝajn animojn al la volo de griza sensenta kaj brutala sistemo kiu rekte devigis nin esti hipokrituloj, mensogantoj kaj trompantoj; oni katenis nin per premanta ĉemizo de paragrafoj, malobeo kaj kontraŭstaro de kiuj minacis havi fatalan influon je la tuta venonta ekzisto de homo; de tago al tago, kaj de horo al horo ni ŝanceliĝis en nerva ekscito, ĉar ni neniam estis certaj, ke ni scias ĉion, pri kio oni demandos nin, ni neniam estis certaj, ke ne sidas teruraj krimoj en niaj laboroj kaj lecionoj; oni donis al ni klapojn sur la okulojn, por ke ni ne vidu la mondon kaj vivon kaj oni plenigis nin per abstraktaĵoj, malvivaĵoj kaj senvaloraj ruinaĵoj de mortintaj mondoj, kiujn ni post jaroj devis ĉiujn forgesi por esti homoj kaj por povi entute vivi; la plej granda parto da instruistoj, pli nervozaj ankoraŭ ol ni, premita per katenoj de paragrafoj kiel ni, en la privata vivo multefoje malfeliĉaj kaj malesperigitaj, ne sukcesis, ke ĝi ne sentigu al ni la kapricojn de ĝiaj humoroj — ah, kompreneble la koncio pri tio ne formiĝas ĉe oni racie kaj ne tuj en la unua klaso.. sed oni sentas tion kaj la sen-

*) Novarum rerum cupiditas (lat.) = rapideco de novaĵoj. *La red.*

konsciaj konaĵoj amasiĝas kiel maldolĉa malklaraĵo sur la fundo de l'animo kaj kiam ajn la rememoro malsuprenigas tien, ĝi ĉiam tuŝas ĝin, ekturniĝas ĝin... Por mi la lernejo, estis terurplena malliberejo: se mia rigardo ekdirektis sin el tiu ĉambro tra fenestro eksteren kaj ekvidis tie sur la ĉielo blankan nubeton, ĉiam trakuris min la sopiro por la libereco, por herbaroj kaj arbaroj, por mia perdita paradizo...

(XV, 79.)

— Se oni konfesas — mi ne diros la pekojn — sed la farojn de sia juneco, oni venas ofte al la momentoj, pri kiuj oni dezirus, ke ili estu legataj per la voĉo plej mallaŭta kaj aŭskultataj de la koro ĉion komprenanta kaj ĉion pardonanta. Ĉar tia juneco estas kvazaŭ vivoplena ĉevalido: ĝi galope rapidkuras ne sciante ofte kial, ĝi timigas kaj terurigas multan saĝan homon, ĝi faligas la infanon ludantan kun ŝtoneto sur strato — ho, kiam tia ĉevalido plenkreskas kaj kiel saĝa ĉevalo ĉiutage trenas sian tramveturilon, tiam ĝi konas la celon de sia vojaĝo, la sencon de la vivo, ĝi estas jam saĝa kaj prudenta kaj ĝi rigardas siajn junajn jarojn kiel iun fremdan plusquamperfectum — — eh, mi volas propre diri, ke tia homo estas al sia juneco tiel objektiva kiel lia leganto kaj ĝi konfesas, kio estis, senrigarde tion, kio sekvis poste. (XXXVI 176-177)

— la malamo ĉiam lasas postsignojn, la amo ne —

(XXXVI, 177)

— Ĉiu aparta amantiĝo de homo havas siajn specialajn odoron, koloron, karakteron, stilon kaj melodion. Kaj ĝi entenas ilin ankaŭ en rememoroj, kie la tuta historieto kuŝas malviva kaj kompleta kiel premita floro en herbario. Ankaŭ la homo mem estas en ĉiu amo tute alia, tute diferenca, tiel malsimila, ke post jaroj rememorante kaj komparante, ĝi ne ekkonas sin mem. La amo ŝanĝas eĉ la plej fortajn karakterojn kiel la malsano. Kaj dioj scias, kiuj ĉiuj komponentoj tie efikas kune! Elektro de individuoj, sociaj rilatoj, tempo, loko, parfumo, per kiu la amata estaĵo havas vestaĵon ŝprucumitan —. — (XXXVIII, 187)

— Eble ekzistas neniu, kiu scius forgesi la sonoron de la sonoriloj en Stará Boleslav... Kaj tiuj sonoriloj, tiuj karaj sonoriloj servas propre sole por malsaĝigi la popolon, al la regantoj de mallumaĵoj... Unu el la ruzegaj efektoj klerikaj je poezio de la homa animo. — (L, 264)

— En la amikeco de junaj homoj estas ĉiam unu despoto, alia ĉiam regato. — (LXX, 369)

— ... Kio estas »evoluo de la homo«? Studo de si mem kaj senĉesa venkado super si mem. En la nekontrolebla kaŝita laborejo nia animo konstruas al si el la konaĵoj de vivo kaj mondo sian sistemon: kio estas vivo, kiaj estas ĝiaj rilatoj al la dio, mondo, nacio kaj socio kaj kiel ĝin vivi? — kaj apenaŭ ĝi finis la konstruon, ĝi atakas ĝin, dismetas ĝin kaj konstruas la novan. Ĉar la fluo de la vivo alportis al ĝi novajn konaĵojn kaj ĝi mem akiris novajn spertojn ... Kiam do la homo estas preta en sia evoluo? Neniam. Kaj ve al ĝi, se ĝi estas preta — se ĝi estas samtempe poeto. »Tanta rei«, ĉio pasas. Ankaŭ tiu lia »mi« ŝanĝiĝas per evoluo, per sinedukado. La solan leĝodonanton kaj punantan juĝiston ĝi havas en si: la propran konsciencon. Ekzistas neniu alia leĝo, nek religio nek moralo. Kaj la konscienco kiel leĝodonanto kaj konsilanto estas delikata, kiel punanta juĝisto ĝi estas terura. Ĝiaj konsiloj kaj leĝoj estas mallaŭtaj, apenaŭ aŭdeblaj, kaj estas necesa la senĉesa aŭtodisciplino por scii ilin obei. Kaj se oni postiras ĝian voĉon, tiam la linio de evoluo aperas kiel regula geometria kurblinio sen rompoj, anguloj kaj perfortaj kurbiĝoj. La homo estas ia mondo por si mem kaj ĝi kiel ĉiuj mondoj en la universo havas siajn leĝojn, sian evoluon, sian vojon ... —

(LXXI, 376)

— Mi estis cinikulo kaj skeptikulo. Mi neniam sentis la mankon de dio, ĉar mi lin neniam bezonis; mi multe malamis, ĉar mi sciis nenion ami; la ĝojon pro vivo mi ne sentis, ĉar la ĝojoj ne estis en ĝi. Kiel mi malkonfesadis ĉiun pli varman senton, mi malkonfesadis ankaŭ la senton pri amo kaj aparteno al sia nacio, ĉar mi en konkretaj okazoj vidis sub ĉiu tia sento sole egoismon kaj profitemon; mi malamis ĉiun montron de entuziasmo, ĉar ŝajnis al mi, ke ĝi tuŝas la limojn de frenezeco; mi enuis, ĉar mia malplena vivo estis por mi ŝarĝo; mi tiranis miajn amikojn, ĉar mi ekkonis iliajn malfortajn ecojn kaj tuj superigis min super ili. Jes, la sola sopiro vivis en mia animo: la sopiro pro io senfina. Pro senfinaĵo en la sento, en la amo, amikeco. Kaj kie mi troviĝis sur la limo de la senfino, kie mi ĉion konis, mi komencis malami. — (LXXI, 377)

— Ni ĉiuj viroj, opiniis fraŭlino Kora, amas en sia karaktero ion sklavantan; se ni ekamas la virinon, ni starigas ŝin tuj alte, neordinare alte super ni — sole por posedi la motivon por sklavi. Ni metas ĝin tiel alten, ke tio, kion ni amas, jam ne estas propre virino, sed fantomo de nia fantazio.

Kaj ŝi bedaŭrinda idolo, se foje ŝi donas al sia sklavo ĉion, kion ŝi havas, ŝi estas perdita. Li ekkonas, ke li trompiĝis, ke lia fantomo ne respondas al la realaĵo kaj la kolero pro seniluziiĝo turnas sin ne kontraŭ si mem, sed kontraŭ tiu virino. Brutaleco de sklavema karaktero de viro... — (LXXIV, 394)

— eh, subite la ideo »amo« staris antaŭ mi kiel malnova sentaŭga mensogo, pri kiu ĉiu scias kaj sentas, ke ĝi estas malvero, sed tamen oni ĝin prezentas, kaj oni donas ĝin al si reciproke kiel sanktigitan hostion, oni scias rigardi unu al la alia en okulojn serioze kaj longe kaj neniom estas al oni abomena tiu komedio. — (LXIV, 398)

— Kaj la soldata vivo, tiom atestos al mi ĉiuj estintaj soldatoj, malgraŭ ĉiuj ekzercoj kaj klopodoj faras el ĉiu grandegan mallaboremulon, kaj la soldata mallaboremo iras kune kun la sovaĝeco. — (LXIV, 419)

— Estas agrabla kaj edifanta sento esti justa al mortinto... estis certe tiel ĉe ni, estos certe tiel kun ni... — (LXV, 428)

## RŮZNÁ SDĚLENÍ.

**Esperantské klasobraní z děl českých autorů.** Pod názvem *»El la bohema floraro«* (Z českých luhů) bude »Čes. esp.« uveřejňovati v esperantském překladě výběr citátů a úryvků (pozoruhodných buď obsahem buď formou) z význačných děl předních českých spisovatelů. »Čes. esp.« chce tím seznamovati cizinu aspoň úryvkovitě s myšlenkami českých děl, jež z různých důvodů není lze zatím vydati esperantem celé. Výběr bude se vyznačovati touž pečlivostí a týmž pokrokovým hlediskem jako výběr článků, jež »Čes. esp.« z češtiny uvádí esperantem na forum světové. Klasobraní to zahájené úryvky z Macharových »Konfessí literáta« (Čes. esp. IV, 3) bude zajisté i mnohému českému čtenáři vítaným vodítkem, ukázkou, jak čísti, upozorněním, čeho si při četbě všímati. Podobné klasobraní, v jiné formě (pod názvem *»Pensoj el la libroj«)* bude »Čes. esp.« uveřejňovati také z literatury světové. *Red.*

**Písemný kurs esperanta.** Vzhledem k tomu, že je mnoho osob, které nemohouce se účastniti veřejných kursů, žádají nás o písemné vyučování, aby při učení byli kontrolováni a opravováni, rozhodli jsme se uspořádati pro své předplatitele hromadný písemný kurs pro začátečníky (později snad i pro pokročilé), v němž ve 20—30 týdenních lekcích bude lehkým a snadno srozumitelným způsobem zpracováno vše, co si z esperanta dlužno osvojiti ku praktické konversaci a korrespondenci. Kurs je bezplatný pro každého, kdo aspoň pololetní předplatné na »Č. e.« (2 K) zašle. Prvá lekce rozeslána bude 31. ledna. Dodatečné přihlášky přijímá administrace ještě do 31. ledna 1910. *Adm.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III, 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.